

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato.

Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon.

Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.30 svis. fr., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3/2 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 10 germ. mk. por germanoj, baltoj kaj balkananoj, 5 germ. mk. por rusoj, 12 hung. kr., 60 pol. mk., 300 aŭstr. kr.; alivalutuloj pagas samvaloron de 0.50 franc. fr. aŭ unu stampitan respond-kuponon.

Jarabono kostas la prezon de 50 n-oj (por brit. 15 ŝil.). Por Adresanĝoj ni kalkulas la prezon de 2 n-oj. Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 41.

Germanoj abonu je favorprezo ĉe sia poŝtoŭficejo. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj, por malbonvalutuloj la prezon de 500 numeroj.

Malsatantaj
samideanoj

EN RUSLANDO, E. T. AKCEPTAS KAJ FORSENDAS MONDACCION PERE DE SIA ABONEJO EN MOSKVO

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura red.: Zanon.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭ pago 12 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 99 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 27. Aŭgusto 1922.

La nova organizo de la Esperantistoj.

Propono
prezentita de la Komisiono por Ĝenerala Organizo al la XIV-a Universala Kongreso.

Oficiala Esperantista Organizo.
La Kongreso rekomendas ke, por koncentrigi la fortojn de la Esperantistaro kaj trovi monrimedojn por subteni la ĝeneralan movadon, la Oficiala Esperantista Organizo estu jena:

I.
1. La naciaj societoj elektu Konstantan Re prezentantaron de la Naciaj Societoj (K. R.), konsistantan el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo, kun nombro da voĉoj proporcia je la nombro de anoj, por kiu ĝi pagis kotizon al la kaso de la K. R. Tiu reprezentantaro starigos sian internan regularon. Ĝi povos havi Prezidanton kaj Ĝeneralan Sekretarion elektitajn eksterne de la Re prezentantaro. Ĝi zorgos pri la reciprokaj informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj celoj kaj pri ilia monsubteno al la komunaj Institutoj de la Esperantistaro.

2. La individual Esperantistoj grupiĝu internacie per aliĝo al Universala Esperanto Asocio, kiu disvastigas la ĝeneralan uzadon de la lingvo.

3. La Fakaj (teknikaj kaj profesiaj) Societoj grupiĝu la Esperantistojn por propagando kaj uzado en specialaj rondoj.

II.
La Konstanta Re prezentantaro (K. R.) kaj Universala Esperanto Asocio (UEA) interkonsentos pri la elekto de

Centra Esperanto-Komitato,
kiu konsistos el ses anoj, oficantaj dum tri jaroj kaj reelektotaj po du ĉiujare.

Tiu Centra Esperanto-Komitato zorgos pri la ĝeneralaĵoj interesoj de la movado. Ĝi starigos centran kason kaj por tio enspezas donacojn, kotizojn de kongresoj, kotizojn de Naciaj Societoj pere de la Re prezentantaro, kaj subvencio de UEA.

III.
La Lingva Komitato estas sendependa, sed la Naciaj Societoj, UEA kaj la Fakaj Societoj povas prezenti kandidatojn al ĝi.

IV.
La Centra Esperanto-Komitato decidas pri la okazigo de la Universalaj Kongresoj kaj komisias ilian organizon al

Konstanta Kongresa Komisiono,
kiu enhavos 2 reprezentantojn de la Centra Komitato, du anojn de la Loka Komitato de la estinta kongreso, du anojn de la Loka Komitato de la estonta kongreso, kaj du Kuratorojn de la kongresa kaso.

La Universalaj Kongresoj konsistas el:
solena malferma kunsido;
laboraj kunsidoj, en kiuj la oficialaj institucioj prezentas raportojn kaj aŭdas la rimarkojn kaj deziresprimojn de la kongresanoj;

fakaj kunsidoj;
kunsidoj de la diversaj oficialaj komitatoj aparte aŭ kune.

La Institutoj nomataj „oficialaj“ estas:
la Lingva Komitato (L. K.) kaj ĝia Akademio,
la Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.),
la Universala Esperanto Asocio kun sia Komitato (UEA),
la Centra Esperanto-Komitato (C. K.) kun sia Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.).

V.
Krom la Universalaj Kongresoj povos okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj, laŭ decido de la Centra Komitato, kiu tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj aŭ religiaj.

VI.
La oficialaj komunikoj de la oficialaj Institutoj estas publikigitaj pere de Esperantistaj gazetoj.

KONGRESA RIMO.

Vokas voĉ de Väinämöinen,
Vibras voĉ en vaga vento
Kaj ĝin muĝas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj.

La potenco praa patro
De la kantoj karesantaj,
La bravulo kun la brila
Balaanta blanka barbo
Kaj ĉe l' koro kun kantelo
Kies kordoj sorĉe sonas,
Rayon semas en la sinoj:
Väinämöinen vekiginta
Vigle, veke, varbe vokas,
Logas li al land' de l' lagoj
Kun la filoj festi frate.

Vibras voĉ' en vaga vento:
„Songis mi en sankta sino
De Suomi kaj ripozis
En la revol, rememoroj
De la idoj inspiritaj.
Sed min vekis vok' de l' tempo.
Min el muska tero tiris
Sorĉaj sonoj sonorantaj.

Miri venis mi miraklon:
Patrolingvon de la Mondo:
Lingvon, kiu lutosone,

Lule ludas sur l' lipoj,
Flate, flustre, flirte, flugas.
Dolĉon donas dorlotante,
Muĝas, kiel mar' majesta,
Kun titana tono tondras:
Ideala inda ilo,
Instrumento konkuranta
Kun la kordoj de kantelo.

Miri venis mi miraklon,
Fablajn forton fepolencan,
Kiu tegas tutan teron
Kaj por arda amo armas.
El la disaj, dividitaj
Gentaj grupoj glorie formas,
Fandas fratan familion,
Ravan rondon sub radioj
De l' eterna esperstelo.
Ege ehu elementoj,
Resonadu regionoj
Vekan, varban, vokan voĉon
De la nobla nova sento!

Helpi venis mi heroojn,
Helpi homojn hederrindajn
En la brava batalado
Por la bono, por la beno
De la mondo baraktanta.
Kantu, kordoj de kantelo

Ilin inde invitante
Al la kampoj kalevidaj.
Am-ameo! Amasigu!
Armu vin per arda amo!
Festu frate kun la filoj
Kaj sen laco laboradu!
Luktu firme, forte, faire
Kaj sukoke kapu kole,
Tiun urson ulnoungean,
Monstron de la Mortolando:
La militon malicegan.
Kreu kuna konstruado
Novan, sanktan, savan Sampon
Mir-miraklan muclilon
Por mueli la malamon
Mondon monstre mordadantan.
Fine idoj inspiritaj,
Kiel iam Ilmarinen.
Forĝu firmajn firmamenton
Kun ĉielaj ĉiuj ĉarmo
Dian pompan mondpalaco:
Pian pacon paradizan
Kun la dolĉaj didonacoj
De la fabla feliĉego.”

Al la land' de l' mil da lagoj,
Muskaj montoj murmurantaj
Vefluge kiu la vento
Vokis voĉ de Väinämöinen,
Kolomano de Kalocsay.

La oficialaj dokumentoj kaj raportoj estas publikigitaj per zorgo de la Centra Komitato en **Oficiala Dokumentaro** laŭ siaj nunaj formatoj.

VII.
La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo plenumos la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita.

La Laboraj Kunsidoj de la XIV-a.

(Oficialaj Protokoloj)

Unua Labora Kunsido (10. aŭgusto).
La Kunsido komenciĝas je la 9-a horo, en la Nobelara Domo, sub la prezido de s-o von Frenckell.

La Prezidanto, malfermante la kunsidon, atentigas la ĉeestantaron pri la fakto, ke ĝi okazas en historia loko, kie troviĝas la blazonoj de la finnaj nobelaj antikvaj familioj, inter kiuj estas la propra familio de la Prezidanto de tiu ĉi Kongreso.

La Ĝenerala Sekretario legas la protokolon de la Malferma Solena Kunsido, kiu estas akceptata.

S-o Atanasov salutas la Kongreson en la nomo de la bulgara kongresanoj, kaj f-ino Elsa Fridova en la nomo de la hebrelingvaj Esperantistoj.

La Ĝenerala Sekretario komunikas la laste ricevintajn saluttelegramojn.

S-o Berg, blinda samideano, salutas la Kongreson kaj invitas al partopreno al la kunveno de la blinduloj.

F-ino Varma Jarvenpaa, blinda Esperantistino, deklamas kortuŝantan saluto-poezion, kiun ŝi verkis en la honoro de la Kongreso.

S-o Hendrix atentigas pri la blindula movado kaj alvokas la helpon de ĉiuj samideanoj por ĝin subteni kaj por helpadi „Esperantan Ligilon“.

La Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio estas prezentata al la Kongreso kaj akceptata, sen diskuto.

S-o Isbrücker, kiu anstataŭas la Prezidanton de la Komisiono pri Ĝenerala Organizo, s-o Page, prezentas raporton pri la laboroj de tiu Komisiono. Li sciigas, ke post diversspecaj malhelpoj interkonsento okazis inter la du flankoj de nia movado, t. e. Centra Oficejo kaj UEA. Sekve, la tuta Komisiono akceptis tiun interkonsenton.

D-ro Privat donas skizon de tiu interkonsento. Laŭ ĝi, la Esperantistoj estas konsiderataj laŭ du manieroj: kiel anoj de naciaj, regionalaj kaj lokaj societoj kaj grupoj, kiuj zorgas pri propagando en siaj landoj, kaj laŭ individuoj, kiuj grupiĝas internacie por la ĝenerala uzado de la lingvo. Laŭ la unua maniero, ili grupiĝos en Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj, kun sideo en Paris, kaj laŭ la dua maniero, ili grupiĝos en UEA. Tiu du organizmoj interkonsentos por elekti Centran Esperanto-Komitaton, kiu zorgos pri la ĝeneralaĵoj interesoj de la tuta movado. Tiu Komitato ne konsistos el tri anoj de la Re prezentantaro kaj el tri anoj de UEA, sed el ses anoj, kiuj reprezentos ĉiujn ambaŭ organizaĵojn. Tiu Centra Komitato delegos Komisionon por organizi la Kongresojn, kaj ĝi povos organizi ankaŭ teknikajn internaciajn konferencojn. La Lingva Komitato restas sendependa. La Esperantistoj grupiĝas ankaŭ en Fakaj societoj, kiuj havas kunsidojn dum la Kongresoj, prezentas kandidatojn al la Lingva Komitato kaj povas kunlabori pri la organizo de la teknikaj konferencoj.

Fine, D-ro Privat legas la tekston de la interkonsento (vidu supren!) kaj sciigas, ke ĝi povos esti morgaŭ disdonata al la interesatoj.

S-o Chavet, kiu reprezentas la Centran Oficejon en la Komisiono, klarigas kiamaniere la interkonsento efektiviĝis dum longa interparolado inter D-ro Privat kaj li. Ĉar s-o Page skribis al li, ke tiu senpera akordiĝo inter la du flankoj estus la plej bona vojo por solvi la demandon, li esperis prave, ke tiu interkonsento ricevus la aprobon de la tuta Komisiono, kaj tio okazis post longa kaj detala esplorado. Li nun esperas kaj forte deziras, ke la Kongreso ankaŭ akceptu tiun planon de organizo. Eble kelkaj pensos, ke ĝi ne estas tiel perfekta kiel la projekto de Universal Ligo (vidu ET n-o 90!) tiel bone verkita de s-o Page. Sed nek la Centra Oficejo nek UEA akceptis tiun projekton, kiu ŝajnis al ili ambaŭ ne realigebla en la nunaj cirkonstancoj. Tamen

Venontan jaron en Nürnberg.

La XIV-a decidis, ke la XV-a okazu en Nürnberg. Kun granda ĝojo ankaŭ la redakcio de ET sciigis pri tiu decido. Post kiam la italaĵ samideanoj rezignis, kaj Warszawa preferas atendi ĝis 1924 por samtempe inaŭguri la Tomboŝtonon por nia Majstro †, restis la invito de Nürnberg la sole konsiderinda.

La Esp. movado en Germanlando estas plej vigla, la oficialaj sferoj estas favoraj, la germana valuto estas malalta, kaj Nürnberg mem ankaŭ havas vigan movadon, estas mond fama pro sia arto kaj komerco kaj speciale en Esperantujo konata, ĉar ĝi vivadis niaj unuaj pioniroj, estiĝis la unua Esp. organizaĵo, aperis la unua Esp. gazeto.

La redakcio de ET ĉi tiu tutkore salutas la decido de la XIV-a kaj promesas ĉiuforte akceli la sukceson de la XV-a per publikigo de multnombraj artikoloj kaj ilustraĵoj pri Nürnberg kaj la kongresa lando kaj de la kongreskomunikoj (se eble ĉiusemajne), kio estos tiom pli facila, ĉar ET estas eldonata en la kongreslando kaj ĉar ekzistas bonegaj rilatoj kun la kongresurbo.

Ni deziras ankoraŭ atentigi, ke ni precipe ĝojus, se GEA konsentus aranĝi Antaŭkongreson en la okupita teritorio de Rejnlando, t. e. en Köln, kie povus facile kolektiĝi la kongresanoj el la okcidentaj kaj nordaj landoj por fari komunan vojaĝon tra Frankfurt al Nürnberg (parte per speciala ŝipo sur la admirinda Rejnrivero, poste per fervojo); ĉar ĝuste Köln, pro la okupacio, fariĝis vere internacia urbo, en kies ĉefstratoj oni aŭdas preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo, ankaŭ Esperanton, kaj kie tiel Esp. manifestacio havus tute specialan signifon.

Do, venontan jaron en Germanlando!

la laboro de s-o Page estis tre utila bazo por la atingo de la fina interkonsento, kaj s-o Page meritas dankojn de ĉiuj por sia granda bona laboro. Li finas esprimante sian fortan konvinkon, ke la nuna interkonsento bone povas funkcii kaj frukto-done labori.

S-o Cernohvostov esprimas sian ĝojon pri la interkonsento, kiun li aprobas. Li proponas, ke oni elektu komisionon por verki modelan planon de Regularo por la Naciaj Societoj kaj Lokaj Grupoj.

S-o Narita ankaŭ esprimas sian aprobon de la interkonsento kaj sian dankon al la Komisiono por la farita laboro.

S-o Feliks Diez akceptas la interkonsenton kaj proponas, ke la Regularo atentu kaj respektu la naciajn apartaĵojn. Li donas skizon pri la rolo de la grupoj kaj pri ilia modela organizo.

S-o Paul Nylén, je la nomo de la Sveda Federacio, aprobas la interkonsenton kaj dankas ĝiajn verkintojn.

D-ro Arnold, ano de la Komisiono, diras, ke malgraŭ komenca senluziĝo li tamen devis konstanti, ke la maksimumo estas atingita, kaj li aprobas la projekton. Li atentigas pri la danĝero de simpla aprobo per entuziasmo momenta, kaj proponas, ke oni bone esploru la aferon laŭ la financa vidpunkto. Li esperas, ke la nuna malbona situacio rilata al la financa subteno de la oficialaj institucioj pliboniĝos. Li proponas, ke la definitiva voĉdono de la Kongreso pri la projekto okazu nur morgaŭ, kiam ĉiuj povos havi la tekston en mano, kaj li proponas ankaŭ, ke okazu kunveno de reprezentantoj de la Naciaj Societoj, por ne-oficiale preparoli la aferon.

Tiuj proponoj estas aprobatataj, kaj la proponita kunveno estas fiksita je lundo matene.

S-o Merchant, Prezidanto de la Brita Esp. Asocio, ĝojas pri la interkonsento kaj aprobas ĝin.

S-o Sakaria parolas pri la maniero difini, kio estas Nacia Societo, kaj li interkonsentas, ke sub tiu nomo oni parolas pri tutnaciaj societoj.

Eniras en la salonon Sinjoro Kolonelo Almaeloeus-Alma, Adjutanto de Sinjoro Prezidanto de la Finna Respubliko. S-o von Frenckell, Prezidanto, salutas lin je la nomo de la Kongreso, kaj petas lin transdoni al Sinjoro Prezidanto de la Respubliko la dankojn de la Kongreso por la signo de intereso, kiun li donas al nia afero.

S-ro Cernohvostov ankaŭ parolas pri la maniero difini la Naciajn Societojn.

D-ro Privat klarigas la rolon de la Naciaj Societoj kaj diras, ke, se ekzistas en unu lando du Naciaj Societoj, la Centra Esperanto-Komitato decidus arbitre pri la afero kaj povos akcepti ambaŭ en la Rezentantaro. Pri la financa demando li klarigas, responde al D-ro Arnhold, ke ekzistas almenaŭ tri kaso: la kaso de la Konstanta Rezentantaro, la kaso de UEA, kiuj ambaŭ donos monon al la tria kaso, la kaso de la Centra Komitato.

S-o Bano Miklos (blinda hungaro) opinias, ke la Fakaj Societoj ne rajtas enmiksiĝi en la aferoj de Naciaj Societoj kaj UEA, ĉar ili estas apartaj kolonoj de nia movado.

S-o Salo Grenkamp-Kornfeld transdonas la saluton de la Pola Libera Skoltismo kaj ĝojas pri la interkonsento. Li atentigas pri la okazontaj fakaj kunsidoj dum tiu ĉi Kongreso.

D-ro Privat proponas, ke oni voĉdonu dankon rezolucion al s-o Page pro lia valora laboro, kaj ankaŭ al Sinjoro Generalo Sebert kaj s-o Stettler. Li priskribas la belan vivon de Generalo Sebert, plej maljuna kaj plej juna samideano, kiu ĉiam pensas pri nia afero kaj ne malesperas malgraŭ ĉiuj oftaj malfacilaĵoj. Li diras, ke s-o Stettler estas plej kompetenta kaj laborema prezidanto por UEA, kaj li esperas, ke baldaŭ resaniĝo ebligas al li labori denove kun sia tuta kutima energio por nia afero.

La Kongreso unuanime akceptas la jenajn tekstojn de la proponitaj Rezolucioj:

La Kongreso esprimas al s-o Page, prezidanto de la Komisiono por Ĝenerala Organizo, profundan dankon pro lia granda laboro, kiu estis utila bazo por la starigo de la fina interkonsento.

La Kongreso esprimas al Sinjoro Generalo Sebert sian grandan dankon pro lia konstanta kaj persistema laboro por nia afero, kiun li daŭrigas malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj.

La Kongreso sendas al s-o Stettler, prezidanto de UEA, plej koran saluton kaj deziron de resaniĝo, esperante, ke li baldaŭ reprenos sian utilan laboron en la internacia organizo.

S-o J. M. Warden esprimas ankaŭ siajn dankojn al s-o Page, kiun li vidis labori dum unu jaro en Edinburgo pri la organiza demando, kaj li diras, ke estas dank' al tiu senlaca laboro, ke la nuna rezulto estas atingita.

La Prezidanto proponas kaj la Kongreso unuanime akceptas danki la Direktanton de la miksa ĥoro „Suomen Laulu“, s-on Heikki Klemetti, kaj ĉiujn anojn de tiu ĥoro pro la bela koncerto, kiun ili donis al la kongresanoj hieraŭ, en kiu ili kantis ankaŭ en Esperanto.

La kunsido estas fermata je la 12-a horo.

Dua Labora Kunsido (10. aŭgusto.)

D-ro Privat, vicprezidanto de la Kongreso, prezidas la kunsidon. Li sciligas, ke hieraŭ en la unua laborkunsido de UEA li organizis monokolekton por la krea Centra Komitato kaj ke tiu monokolekto donis bonajn rezultatojn, kiuj estos publikigitaj en la ĵurnalo Esperanto, per zorgoj de s-o Jakob, sekretario de la Kongreso.

VERDA FELIETONO.

Tra mia fenestreto.

En katakomboj de Romo? — Mia ruĝa najbaro. — Bolŝevika kaŝkunsido? — Pli da'lumo! — Verda strikanto. — En Danzig'a Antaŭkongreso. — Centobla milionulo. — Nia malica onklino. — Ŝia reto. — Liberecon por la verdaj fiŝoj en venonta jaro.

Mi paŝas en nigran truon, faletas pro iu lignaĵo kaj... sidfalliĝas sur seĝon.

Kie mi estas?

Sur longaj tabloj staras brulantaj kandeloj. Ilia ruĝeta lumo brilas en mistera soleno. Nur malklare ĝi ekkonigas al mi la ĉirkaŭaĵon. Mal-lumaj muroj arkajligas gigante kaj minacas per malĝojeta seriozo. Sur la flankaj muroj aperas iuj nekkoneblaj misteraj pentraĵoj. La ruĝeta kandelala lumo lumigas seriozajn vizaĝojn de sidantaj ĝesinoroj. Ili vigle interparolas duonlaŭte.

La ruĝaj lumoj brilas kvazaŭ torĉoj en misteraj katakomboj de Romo. Kaj la murmurado de la sidantoj sonas solene kvazaŭ preĝado de kunvenintaj kristanoj. Ĉu ili kunvenis ĉi tien subtere por komune preĝi kaj ĉerpi novan konsolon kaj esperon en Kristo? Por forliti sin por novaj turmentoj?...

Sed io konfuzas min. Tio estas multaj glasoj starantaj surtablo... ĉu estas eble, ke kristanoj jam trinkis bieron dum siaj kunsidoj? Ĉu eble ankaŭ ili ĉerpls el tiuj glasoj konsolon — kiel la hodiaŭuloj ĝin faras? Kaj siranga afero — la kandelaj estas fiksitaj en kandelingo, kies parencon rilaton al bierglasoj mi ne povas nei. Estas bieraj botelĉi! Ĉu povas ekzisti tiaj produktaĵoj de Krista epoko?

Mi turnas min al mia najbaro:

„Diru al mi, sinjoro, kion signifas tiaj brulantaj kandeloj?“

La Prezidanto sciligas, ke li jam ricevis interesajn raportojn pri okazintaj fakaj kunsidoj, kaj li memorigas, ke la sekretarioj de la Fakaj Kunsidoj devas ĉiuj sendi siajn raportojn al la Kongreso, kaj prezenti al la Kongreso, por ke ili fariĝu deziresprimoj de la tuta Kongreso, la plej gravajn el iliaj rezolucioj, inter tiuj, kiuj havas ĝeneralan intereson.

La Prezidanto komunikas al la Kongreso la decidojn de la Faka Kunsido de la Ruĝa Kruco kaj atentigas pri la graveco de tiu rezolucio. Li aldonas, ke la Esperantistoj havas la devon interliti kun la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco kaj proponi siajn kunlaborojn. Li promesas publikigi trifoje ĉiujare en „Esperanto“ adresaron de junuloj, anoj de la Ruĝa Kruco, kiuj deziras korespondadi.

S-o Horner, oficiala reprezentanto de la Ruĝa Kruco, petas la Kongreson aprobi rezolucion, ĉar tiu aprobo alportos grandan helpon por la propagando de Esperanto en tiu rondo.

S-o Warden ankaŭ proponas, ke la Kongreso konfirmu tiun rezolucion, kaj li memorigas, ke Esperanto estis jam uzita de la Ruĝa Kruco dum la milito pere de la franca registaro, kaj tiu uzado estis tre fruktodona.

La rezolucio de la Faka Kunsido de la Ruĝa Kruco estas unuanime akceptata.

La Prezidanto komunikas leteron de la Komitato de la Y. M. C. A., kiu akreditas s-on Horner por ĝin reprezenti en la Kongreso, kaj li petas s-on Horner danki tiun gravan kaj potencon asocion por la signo de intereso, kiun ĝi donis al nia movado.

La Prezidanto komunikas proponon de s-o Delanoue, laŭ kiu la Kongreso esprimas la deziron, ke Sinjoro Ministro de Instruado de Finnlando, kiu ĉeestis nian malferman kunsidon, informu siajn kolegojn de la ceteraj landoj pri la praktik-eco de Esperanto.

D-ro Arnhold timas, ke tiu propono ne havos efikon kaj li diras, ke la plej bona sekvota vojo estas, ke la kongresanoj de la diversaj nacioj vizitu siajn respektivajn ambasadorojn kaj konsulojn, por ke ili raportu al siaj registaroj. Li diras, ke la germana ambasadoro en Helsinko jam akceptis ricevi la viziton de la germanaj kongresanoj.

S-o Essigman subtenas la proponon de D-ro Arnhold.

La Prezidanto diras, ke oni povos eble sendi delegacion al la Finnlanda Registaro por danki ĝin pro ĝia afabla intereso pri la Kongreso kaj peti, ke ĝi trovu la plej bonan vojon por informi la ceterajn registarojn pri la rezultoj de nia Kongreso.

S-o Delanoue akceptas tiun solvon, kiun la Kongreso unuanime aprobas.

S-o Chavet, ĝenerala sekretario, legas la Protokolon de la unua labora kunsido; ĝi estas akceptata sen diskuto, post korektigo per D-ro Arnhold.

La Prezidanto disdonigas al la ĉeestantoj la tekston de la Propono de la Komisiono pri Ĝenerala Organizo (vidu supre), kiu estis analizi- ta en la unua laborkunsido kaj principe akceptita.

S-oj Warden kaj Cernohvostov prezentas lingvajn malgravajn korektojn, kiuj estas akceptataj.

Laŭ propono de s-o Sakaria, la teksto estas esplorata paragrafo post paragrafo.

Pri la unua artikolo rilatanta al la Rezentantaro, s-o Isbrücker proponas, ke la Kongreso elektu de nun la estraron de tiu Rezentantaro.

S-o Prezidanto diras, ke tiu propono ne povas esti enmetata en la teksto mem de la rezolucio, sed ke oni diskutos ĝin poste.

Je la tria paragrafo de la unua artikolo, s-o Ginz proponas, ke oni enmetu „3. Krom tio, la Fakaj Societoj...“

„Mi mem ne scias tion precize. Kiel mi atidis, la lumigo ĉi tie ne funkcias. Pro tio oni devis helpi sin per tiaj lumigiloj.“

Li interesas min, kaj mi demandas lin, de kie li venis.

„De Niŝni-Novgorod.“

„El Bolŝevikujo?“

„Certe, kiel delegito de la tieaj grupoj kaj centroj.“

Mi esplordemandas lin kaj sciligas, ke li estas ĉefredaktoro de la „Ruĝa Esperantisto“. Li montras al mi sian bolŝevikan pasporton...

A, nun mi scias, kie mi estas. Sendube estas kaŝa kunsido de bolŝevikoj kaj komunistoj. Kaj mia najbaro venis kiel delegito de Bolŝevikujo. Pro tio ankaŭ tiuj kvinplintaj steloj, kiujn portas ĉiuj sidantoj surbruste... pro tio tiu mistera subtera salonego, kaŝita kontraŭ la polico... pro tio tiuj kandeloj, kiuj dissendas ruĝan lumon! Ruĝan...

Mi levas min kaj ĉirkaŭiradas inter la tabloj. Juna sinjoro ekparolas min.

„Iomete mallume ĉi tie,“ li diras, „kaj ne facile estas trovi konatojn.“

Mi konsentas.

„Sed la lumo de nia stelo devas sufiĉi al ni,“ li konsolas. „Kaj tiu lumo estas pli forta ol iu ajn alia, ĉar ĝi penetras ĝis la fundo de niaj koroj.“

Ankaŭ pri tio mi eldiras mian konsenton, kvankam mi ne tute komprenas liajn parolojn. „Kaj vi eĉ havas duoblan lumon,“ li ridetas. „Mi?“

Li metas sian montrofingron sur mian bruston. Mi rigardas kaj timiĝas terure, ĉar mi konstatas, ke mi portas eĉ du stelojn.

„Vi estas prava,“ mi diras kun miro, „mi tion tute ne scias.“

Tiu propono ne estas akceptata post klarigo de s-o Chavet.

S-o Gordon demandas, kiu estas la nomo de la nova organizaĵo.

Post klarigoj de s-o Privat kaj Edwards oni decidis ne doni alian ĝeneralan nomon al la tutmonda Esperantistaro.

La artikolo I estas akceptata unuanime.

La artikolo II estas ankaŭ unuanime akceptata sen diskuto.

Post rimarkoj kaj proponoj pri malgravaj lingvaj korektigoj de s-oj Chavet, Privat, Eilersiek, Jakob, Arnhold kaj Isbrücker la artikolo III estas unuanime akceptata.

La artikoloj IV kaj V estas akceptataj sen diskuto.

Pri la paragrafo VI s-oj Privat, Edwards, Cernohvostov, f-ino Noll, s-oj Diez, Sakaria kaj Nylén petas diversajn klarigojn pri la maniero, laŭ kiu la oficialaj komunikoj estos dissendataj al la Esperantista gazetaro kaj pri la publikigo de la raportoj en la Oficiala Dokumentaro.

Post klarigoj de s-o Chavet la artikolo VI estas akceptata.

La tuta teksto de rezolucio estas fine voĉdonita de la Kongreso unuanime.

La Prezidanto diras, ke ni devas nun voĉdoni rezoluciojn pri praktikaj rimedoj por funkcigi la aferon.

Li proponas por la starigo de la Rezentantaro de la Naciaj Societoj la jenan rezolucion:

La Kongreso, por faciligi la tujan formadon de la Konstanta Rezentantaro de la Naciaj Societoj petas s-on Generalon Sebert kaj s-on Chavet, ke ili bonvolu tuj funkcii kiel provizoraj Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario de la Rezentantaro, ĝis la momento, kiam ĝi mem estos fiksinta sian estraron.

Por respondi al deziresprimoj de s-o Cernohvostov, s-o Privat diras, ke s-o Chavet ĉeestos la venontan kunsidon de la delegitoj de la Naciaj Societoj, kiu okazos laŭ propono kaj sub prezido de D-ro Arnhold, kaj ke li bonvolos raportu al Generalo Sebert pri la deziresprimoj de tiu kunsido.

La propono estas unuanime akceptata.

La Prezidanto prezentas al la Kongreso duan rezolucion pri la Centra Komitato. Jen la teksto:

La nuna Komisiono pri Ĝenerala Organizo bonvolu plenumi la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita.

La anoj de tiu Komisiono estas s-oj Warden, Chavet, Stettler, Privat, Arnhold, Page, Poncet kaj s-o Isbrücker, kiu anstataŭis s-on Page en tiu ĉi Kongreso. S-o Page estos Prezidanto de la Komisiono.

Tiu propono kaj precipe la propono pri la prezido de s-o Page estas akceptata.

Fine, la Prezidanto prezentas al la Kongreso tiun trian rezolucion, kiu estas ankaŭ unuanime akceptata:

La Kongreso petas la Centran Komitaton, ke ĝi zorge revizu kiel eble plej baldaŭ la antaŭajn regularojn pri organizaj aferoj, por ke ili akordiĝu kun la akceptita interkonsento.

La Prezidanto prezentas al la Kongreso la diversajn proponojn de Generalo Sebert, honora prezidanto de la K. K. K. pri ŝanĝoj en la Regularo de niaj Universala Kongreso. Li diras, ke tiuj proponoj povas esti resendataj al la Centra Komitato, kiu ilin esploras.

S-oj Warden kaj Essigman aprobas tiun solvon. Ili ĝenerale malaprobas, ke oni rifuzu la aligon de iu persono al la Kongreso, kaj ili deziras, ke la nuna liberala regulo estu konservata.

Mi reiras al mia tablo kaj sidigas denove apud mia ruĝa najbaro.

Sed nun oni komencas. La orkestro, kiun mi nun rimarkas, ekludas marŝon. Kaj subite ĉiuj levigas kaj ekkantas. Ne la ruĝan Internacion sed la verdan:

„En la mondon venis nova sento...“

Eĉ tri strofojn! Iu sinjoro skuas lomete la kapon, kiam oni komencas duan strofon. Evidente li ĉagreniĝas. Sed estas demando, ĉu pro tio, ke oni tro multe „hinnadas“ aŭ pro tio, ke la kandelala lumo ne permesis al li tiel klare kiel kutime ekkoni la tekston en sia kantilibro. Sed estas lia kulpo. Pro kio li portas nian steleton surbruste, kiu lumigas la tekston?... Kaj kiam oni komencas ekkanti la trian strofon, li... strikas!

Finfine mi scias, kie mi troviĝas. En la „Artushof“ dum Danzig'a Antaŭkongreso.

Parolas diversaj sinjoroj, oficialaj, neoficialaj, en-kaj eksterlandanoj. Poemas fraŭlinoj, ĉarmaj kaj belaj. Junaj knabinoj kaj knabetoj — ĉarmega kvaroj — en flua Esperanto plendas pri la kruelaj insiruistoj, kaj kore petas min, ke ni zorgu pri enkonduko de nia kara lingvo en la lernejoj...

Kaj nun subite ŝajnas al mi, kvazaŭ la salonego pleniĝus je verda hela lumo...

Mia ruĝa — pardonu verda najbaro, samideano Vrankin rakontas al mi diversajn, kaj mi aŭskultas atente. La vojaĝo kostis kelkcent milionojn...

Tondron, mi eksentas teruran respekton! Tiu sinjoro estas centobla milionulo! Kaj mi eĉ ne centona!...

Sed al Helsinko ĉu li ne veturos?

La milionoj ne sufiĉas.

S-ino Cense diras, ke oni ne devas timi, ke kontraŭuloj kaj neesperantistoj povas aliĝi al niaj Kongresoj, ĉar ili povos eble eliri el tiu ĉeestado argumentojn favorajn al Esperanto.

La Prezidanto proponas kaj la Kongreso akceptas, ke oni simple notu en la protokolo de tiu ĉi kunsido, ke post diskuto oni konstatis la ĝeneralan opinion de la Kongreso, ke tiu ŝanĝo en la Regularo ne estas dezirinda.

Pri la proponoj rilataj al la budĝeto de la Loka Komitato, s-o Setälä diras, ke post lia spertado li opinias, ke la regulo proponataj pri la dividado de la kontoj en du partoj ne estas facile aplikeblaj. Ankaŭ li malaprobas la proponon pri la instruo de Esperanto al enlanduloj (?). Li aprobas la proponon pri la repago de vojaĝspezoj, kun escepto de la lastaj vortoj „se ili tion petas“.

La Prezidanto proponas kaj la Kongreso akceptas, ke oni notu en la protokolaro, ke la Kongreso aplaŭde aprobis la rimarkojn de s-o Setälä.

Pri la periodeco de la Universala Kongresoj parolas s-oj Jakob, Narita, f-ino Noll, s-o Cernohvostov. S-o Privat diras, ke oni ne devas miksi la aferon pri la Universala Kongresoj kun la organizo de la Internaciaj Teknikaj Konferencoj.

S-o Setälä diras ke, se oni bezonas dujaran paŭzon inter du kongresoj, oni povus fari la kongreson en Ameriko aŭ orienta lando dum la intertempo, kiel tio jam okazis por la Kongreso de Washington.

S-ino Cense opinias, ke oni devas konservi la ĉiujaran periodecon por doni al diversaj landoj la okazon havi kongresojn kaj aŭdi almenaŭ unufoje la Esperantan elparolon de eksterlandanoj.

S-o Isbrücker kaj Arnhold opinias same. Ankaŭ subtenas tiun vidpunkton s-o Laquer.

Fine oni akceptas, ke la protokolo notu, ke la ĝenerala opinio de la Kongreso estas kontraŭa al ŝanĝo en la Regularo pri la periodeco de la Kongresoj.

S-o Setälä, sekretario, komunikas al la Kongreso la jenan telegramon de Sinjoro Prezidanto de la Finnlanda Respubliko:

„Dankante sincere por la saluto, mi deziras al la Kongreso plej bonan sukceson.“

Tiu telegramo estas entuziasme aplaŭdata.

D-ro Privat transdonas la prezidan lokon al s-o Sandström, vicprezidanto de la Kongreso, kaj uzas la okazon por memorigi la grandajn servojn faritajn de tiu energia pioniro de Esperanto por la propagando en Finnlando.

La Prezidanto prezentas al diskuto la proponon de la Nederlanda Societo pri la Organizo de Karavanoj de Neesperantistoj al niaj Kongresoj.

S-o Isbrücker diras, ke tiu propono havas nenian malamikan intencion por niaj svedaj samideanoj.

S-o Nylén klarigas, kiamaniere estis organizita en la Praha Kongreso tiu karavano dank' al la iniciato de fervora sveda samideano. Ĝi okazis nur en propaganda celo. Li diras, ke en tiu ĉi Kongreso oni devis akcepti helpkongresanojn, kiuj ne parolas Esperanton, kun speciala insigno.

S-o Jakob, sekretario de UEA, proponas, ke en la estonto UEA estu komisiata por organizi la karavanojn, kaj ĝi zorgos, por ke la anoj de tiuj karavanoj bone komprenos Esperanton.

S-o Isbrücker diras, ke la propono de la Nederlanda Societo ne celis malpermesi la partoprenon al Kongreso de ĉiu ajn persono, kiu ne bone konas Esperanton, kiel ekzemple kelkaj edzinoj de kongresanoj, sed simple malpermesi la organizon de karavanoj de neesperantistoj. Li malaprobas la sistemon de helpkongresanoj uzitan en tiu ĉi Kongreso. Por li la helpkon-

„Ne sufiĉis,“ mi ripetas kaj rigardas supren, kie ŝvebas verda brilanta stelo.

Kio okazas? Ĉu estas la trompiĝo aŭ realeco? La stelo estingiĝas en tiu momento, kaj super mi aperas maljuna sinjorino. Ŝi strange aspektas kun sia ĉapelo, kiu memorigas al mi oran moneregon. Ŝiaj manoj tenas argente brilantan reton, kiu ĉirkaŭas ĉiujn tablojn kaj kurante laŭlonge de la muroj formas delikatan barilon. Kaj ni sidas en ĉi tiu reto kvazaŭ kaptitaj fiŝetoj.

„Kion vi volas ĉi tie?“

Ŝi rikanas malice kaj diras: „Mi kaptis vin en mia reto kaj mi ne permesas, ke iu el vi forkuros.“

„Sed mia najbaro?...“

„Ankaŭ estas kaptita,“ ŝi ridetas. „Li volis forkuri el mia reto, tamen mi sukcesis reteni lin je ĝusta tempo.“

Mi koleriĝas pri tiu malica sinjorino.

„Kiu rajtigas vin pri tiu kapta agado?“ mi demandas severe.

„Trankviliĝu, mia kara neveno,“ ŝi ridetas, „mi estas la onklino de ĉiuj homoj. Sed la Esperantistoj estas miaj specialaj nevoj, kiujn mi amas kiel vera patrino. Ŝajnas, ke vi ne ekkonas min tuj. Sed sufiĉos al vi, se mi diros al vi, ke mia nomo estas ‚Valuto‘.“

„Vi estas onklino Valuto?“ mi ekkrias. „Kaj vi ne volas permesi, ke ni vojaĝos al Helsinko?“

„Vi divenis mian intencion.“

Ŝia ridetanta mieno terure eksaltas min. „Ha!“ mi ekridas triumfe, „sed plene vi tamen ne sukcesis. Tro malfrue vi jetis vinan reton, kara onklino! Sciul! Hodiaŭ frumatene kelkaj fiŝetoj tamen sukcesis forkuri kaj nun naĝas trankvile al Helsinko!...“

Ŝi terure paltiĝas tion aŭdante. Sed mi daŭrigas la triumfan kriadon:

gresanoj, devas esti simple kongresanoj, kiuj aliĝis, se ili ne povas ĉeesti.

Fino Van Rees diras ke, se oni enkondukas en niaj Kongresoj personojn, kiuj ne estas Esperantistoj, tio povos esti armilo kontraŭ ni por niaj malamikoj.

La Propono de la Nederlanda Societo estas fine akceptata, kaj la subpropono de s-o Jakob estas resendata al UEA.

Post salutarparolo de s-o Josef Blažek en la nomo de la Internacia Asocio de Esp. Fervojistoj la Kunsido estas fermata je la 13-a horo.

Tria Labora Kunsido (12. aŭgusto).

Malfermis la kunsidon je la 9-a horo s-o v. Frenckell, donante la parolon al s-o Vilho Setälä por lego de telegramo al la Prezidanto de la Respubliko, dankanta lin por la honoro, kiun li faris, akceptinte la reprezentantojn de la Esperantista movado en sia palaco. Sekvas kelkaj klarigoj kaj ĝeneralaj informoj.

Zamenhofa Monumento.

La kongresanoj havas sub la mano la raporton de s-o Applebaum, honora sekretario de la komitato. Kiel ĉefan citindaĵon ni notas, ke la kolekto donis ĝis nun la jenan rezultaton: en brita mono £ 72.73, en ĉeĥoslovaka 4543,65 kr., en pola 95314 mk., 500 belgaj frankoj, 60 flandaj markoj, 80 liroj, 5 sv. kronoj, 1 holanda guldeno. (Tio estus en svisa mono proksimume 2600 frankoj.)

Pro foresto de s-o Applebaum kaj Page raportas s-o Warden, informante pri la malhelpoj, kiujn devis venki la sekretario.

S-o v. Frenckell petas aprobon de la raporto kun esprimo de danko al la verkinto, submetas je voĉdono la jenan deziresprimon:

La Kongreso esprimas la deziron, ke ĉiuj Esperantistaj societoj instigu la ĝeneralan daŭrigon de la donacado por la monumento de D-ro Zamenhof.

La kunveno aplaŭde akceptas.

S-o Stan. Essigman (Warszawa) nome de la Loka Komitato por la Starigo de l' Monumento informas, ke ĝi estos preta post du jaroj kaj espreble inaŭgurota okaze de la 16-a Kongreso okazonta en Warszawa. Li plej petas la akcepton de jena rezolucio:

Ĉar montriĝis ĉe la Kongreso profunda deziro je baldacia starigo de monumento sur la tombo de nia Majstro, kaj konsiderante la troŝarĝon de la ĝisnuna komitato, merite korekte dankon, la Kongreso trovas necese kaj utile esprimi jenan deziron:

a) La Loka Komitato en Warszawa konsistu el ses anoj, po du el la 3 societoj, garantianta plenan interkonsenton kaj preĝigon de la monumento ĝis la difinita tempo.

b) La Loka Komitato kunvenu almenaŭ dufoje dum monato por preparoli la faritajn kaj farotajn laborojn: protokoloj estu sendataj al la Esperanta gazeto.

c) La Komitato rajtas akcepti aliajn personojn, kiuj per taksu aŭ morala helpo povas utili al ĝi.

La kunveno akceptas unuanime.

Parolas s-o Nylén, aprobante la iniciaton. S-o Setälä anoncas la alvenon de la kuponkartoj, konligas la prezon kaj metodon de vendado. Pri tiu detale raportas s-o Kötzt, menciante la malfacilaĵojn ĉe la presigo.

S-o Essigman informas, ke monumento ne povas esti starigata sur publika placo pro lokaj cirkonstancoj; ĝi estos tombo-monumento, respondanta al la modesta vivo de nia Majstro.

D-ro Privat alproksimiĝante al s-ino Zamenhof resumis la penson, kiu gvidis la iniciatintojn, skizas la penigan vojon, kiun trairis nia Majstro. Li dankas al la vidvino por la heroo persisteco kaj kuraĝo, ebligintaj la starigon de nia movado. Dum plej malhelaj tagoj la konscio agi por la bono de venonta generacio ne forlasis ŝin, kaj

se la Esperantistaro rememoras la kreinton de la lingvo, ĝi neniam forgesas la helpon, kiun a'portis al ĝi lia edzino.

Varme aplaŭdata de la kunveno D-ro Privat premas la manon de S-ino Zamenhof, kiu kortuŝe respondas, dankante.

La Prezidanto donas la parolon al la Ĝenerala Sekretario de UEA por legado de letero de s-o Sklenčka, del. en Hradec-Králové (Ĉeĥoslovakio). S-o Sklenčka bedaŭras ne povi ĉeesti la Kongreson, insistas je pli da iniciatemo ĉe la delegitoj. Li montras kiamaniere UEA kaj nia movado povas alporti utilon per laŭcela uzado de informoj, anoncoj kaj presajoj.

S-o Jakob klarigas manieron de efika propagando, aranĝita de s-o Istel, del. en Wiesbaden, per elmontri de letekovertoj, kiujn la C. O. ricevis el aro da landoj. Rondirigo de fotografaro komprenigu la aranĝon. Propono de s-o Ponce pri perado de Esperantaj gazetoj kaj propono de la Ĝenerala Sekretario pri aliĝo de membroj el Ruslando estas resendataj al la Ĉentra Oficejo per zorgado laŭ plej taŭga maniero.

S-o Sandström transdonas salutojn de la foira kunveno.

Sekvas diversaj informoj de s-o v. Frenckell.

Komisiono pri Instruado.

Raportas D-ro Privat skizante la kreon de tiu ĉi Komisiono, sekve de instigo de la Pola Societo. Rezultiĝis el tio la Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejoj, okazinta en Genève, kiu donis la eblecon al reprezentitaj registaroj, senpartie juĝi laŭ la metoda laborplano la akiritajn spertojn. Li informas pri sendo de raporto al la ministroj de instruado ĉiulandaj, citas la efikon ĉe pluraj el ili, mencias favoran decidon de la albana registaro, promesanta enkondukon de nia lingvo kiel devigan instrufakon post organizo de la lernejoj. Aludas, ke en 151 germanaj lokoj okazas nun oficiala instruado de Esperanto al infanoj, kritikis la indiferentecon de multaj propagandistoj, alvokas je kunhelpo, disciplino, sistema laboro.

Priskribante la Konferencon en Genève, D-ro Privat atentigas pri la valoro de tiaj pure teknikaj kunvenoj, kiuj per relative malmulte da mono kaj klopodo havas sukceson tute aparian kaj bonan. Estas intencate daŭrigi tiajn fakajn kunvenojn.

S-o Arnhold levigas, esprimante la dankon pro la bonega aranĝo de la Konferenco de Genève, klarigas miskomprenon de la laboristaj Esperantistoj. D-ro Privat informas je tiu ĉi afero, ke la laboristaj Esperantistoj havis reprezentantojn en profesoro D-ro Dietterle (komisiita de germanaj laboristoj), s-o Patti (Labor. Esp. en Milano) kaj s-o Young (brita laborista delegito).

Sekvas legado de telegramoj per s-o Chavet, salutas kaj bondeziras la Kongreson s-o Belmonti, fino ĉupichová, Wien'a Esperantistaro, Klubo en Novo-Nikolajevsk, Londona Klubo. (Aplaŭdo.)

D-ro Arnhold proponas sendon de telegramoj al Poŝtista Konferenco nun okazanta en Berlin, proponanta alprenon de Esperanto.

S-o Chavet legas la protokolon de la dua labora kunsido, kiu post korektigo de kelkaj detaloj estas akceptata.

Fermo de la kunsido je la 12-a horo.

Ilustraĵoj pri la XIV-a

ni bedaŭrinde ankoraŭ ne povas presi en la hodiaŭa numero, ĉar ni ĝis nun ne ricevis fotografarojn. Senditaj fotoj eble perdiĝis dumvoje.

Diversajn raportojn

pri Antaŭkongreso en Danzig, fakaj kunvenoj en Helsinko, SAT-kongreso en Frankfurt kaj multajn artikolojn pri devis prokrasti por la venontaj numeroj, pro manko de loko en la hodiaŭa.

Mi parolas do pri larmoj viaj, kiuj similas al fajre ardantaj perloj, falantaj sur koron mian. Ili taŭzas la animon per konscienciproĉo pro via doloro... Sed vi ridetas jam!

Ĉi tiu larma rideto estas la plej valora juvelo de via koro amanta.

4.

Ofte ŝajnas al mi, ke mi vagadas, kun lampeto de Diogeno inter la homoj, serĉante la Homon, sed vane...

Ofte ŝajnas al mi, se explore rigardas mi animon mian, ke ĉiu estas Homo — krom mi.

5.

Se iu demandas: „Kiu vi estas?“ Respondu: „Min baptis la destino kaj nomis min dolor' vivanta!“

Se iu scivolas: „Kiel vi vivas?“ Respondu: „Vivo, plena de rezigno estas nur longedaŭra mortado!“

Se iu pridubas: „Ĉu amis vi iam?“ Respondo via estu la larmino, falinta pro ĉiuj trompiĝoj de via koro.

6.

Hontindaj epokoj kreis la konceptojn pri ĉielo kaj infero. La homoj estis plej malproksime de ekkono de Dio, kiam ili ornamis per ĉifonoj de homaj ecoj, inklinoj la Misteran Forton.

La malperfekteco de l' Homo evidentiĝas en tio, ke la perfektecon li serĉas kaj trovas en si mem.

7.

La okulparolaj parolas. La mutan konversacion komprenas nur la elektitoj.

Liaj okuloj ribele plendas: „Kion valoras la vivo, se morgaŭ ni priploros la plezurojn de l' hodiaŭo?“



D-ro Glesswein kaj s-ino Moscheles en Hyde Park (London) inter samideanoj dum porpaca manifestacio.

„Ne Plu Milito“ Kunveno en Londono.

La suno brilis super Londono je la 29-a de julio, kiam miloj da personoj vizitis la paĉan kunvenon en Hyde Park. Tie sur dekdu estradoj multaj eminentuloj parolis pri la neceseco de mond-paĉo.

Ĉirkaŭ unu estrado homaso aŭskultis la bonekonatan Prezidanton de la Hungara Esperantista Societo, D-ro Aleksandro Glesswein, kiu flue parolis angle pri la urĝaj bezonoj de detruita Eŭropo: Paco kaj Fratamo. Kelkaj kontraŭstaris lian konsilon, ke ĉiu lando forigu la batalvojn, dirante, ke „oni konservu la pacon, preparante la militon“.

Germano, s-o Helmut Gerlach, skvis kaj per sprita parolado pruvis, ke pretiĝo por milito ne certigis la pacon en lia lando.

Rezolucio kontraŭ milito estis akceptata per aklamoj. Post la Kunveno s-ino Moscheles prezentis Esperantistojn al D-ro Glesswein, kiu li afable parolis Esperante al ili. Sur la estrado parolante angle, li estis aliandano; sed inter ni, parolante Esperante, li estis samlandano — ano de Esperantujo, lando sen limoj.

E. L. O., Londono.

Konkurso por infanoj.

Grava avizo. Pli ol 80 infanoj jam estas premiitaj, sed ĝis hodiaŭ nur 4 infanoj mendis librojn. Ni petas ĉiujn infanojn sendintajn leterojn al s-o van Heek tuj sciigi al ni siajn dezirojn. (Vidu libroliston en ET n-o 97) Al ĉiuj nemendantoj ni post 3 semajnoj sendos librojn laŭ nia propra elekto.

Butin & Jung.

Rusaj grupoj kaj samideanoj

al kiuj ni ĝis nun senpage liveris nian ĵurnalon, estas atentigataj, ke n-o 100 estos la lasta senpage sendota al ili. Ni sukcesis aranĝi Abonejon en Moskvo ĉe s-o Mikaelo Valentinov, Ĉudovskoj per. 6, Komitato de Esperantistoj SVJAZI, kiu akceptos pagojn por ni en sovjetaj rubloj, kaj ni petas ĉiujn rusajn grupojn kaj samideanojn, kiuj deziras aboni ET aŭ anonci en ĝi, interiri kun supre nomita Abonejo en Moskvo.

Ĝiaj okuloj varme konsolas: „Kiu, se eĉ unufoje, estis amata, jam ne havas rajton riproĉi la vivon!“

8.

Lasta blasfemanta vekiĝo de mortanta soldato, kiu jam delonge ripozas en fremda tero, turmente sonas al miaj oreloj. Mia kuglo mortigis lin sur kampo batala, kaj de tiam senĉese tentas tiu ĉi lasta krio. Eĉ nun sonas la muta voĉo riproĉplene...

„Ĉu vi ne pardonis min?“ petege alparolas mi la fantomon.

„Se mi estus pardoninta, jam vi ripozus apud mi, sed vi devas vivi longedaŭre por penti la kulpon, kiun vi faris kontraŭ miaj orfoj!“

9.

Odoro estas la animo de l' floro. Ĝi estas sincera kaj pro tio konigas sin.

Vorto estas la animo de l' Homo. Ĝi estas portreto de l' karaktero... Tamen la majeste simpla animo de l' floro pli valoras, ĉar ĝi mensogas — neniam.

10.

Sopiris mi je soleco kaj nun, havante ĝin, turmentas min — la silento. For de l' mondo mi rifugiĝis por ne vidi la homojn, sed akompanis min la fantomoj...

Feliĉa estas tiu, kiu povas mortigi siajn rememorojn, sed ve al mi, kiu ne povas ilin eĉ forgesi...

Ho sonu, nur sonu tremantaj arpeĝoj, kiel funebraj muzikoj ĉe enterigo de vivanta animo...

Julio Baghy.

Parolejo.

122. Ni estu precizaj.

En ET n-o 95, sub rubriko „Mallongaj Esperantaj Sciigoj“ oni legas: „La raportisto pri la budĝeto de la Ligo de Nacioj sciigas ke la elspesoj de la Ligo povus esti reduktataj al unu kvarono se oni nur uzus unu solan lingvon“.

Tio ĉi estas sufiĉe miriga aserto, kaj se oni ripetus ĝin, ĉi pensema re-Esperantisto li certe demandus kiam kaj en kiu oficiala eldonaĵo oni trovas la informon. Jam plurfoje en via gazeto vi atentigis pri la neceso de precizaj detaloj, kaj mi esperas ke en ĉi tiu okazo ni ricevos pluan sciigon, ĉar Esperantistoj devas esti la plej singardaj rilate al tiaj asertoj.

(C. Port Said.)

Rim. de Red. Ni petas la sendinton de la konkerna sciigo, informi nin pri la oficiala dokumento, kiu enhavis la sciigon.

Redakcia Respondejo.

Al diversaj skribintoj. Estas fakte neeble al ni respondi al ĉiuj. Nia laboro estas tro multa, precipe nun antaŭ eldono de ET n-o 100 kaj de „Int. Scienca Revuo“. Krome ni havas lastatempe multe da embaraso kaj eĉ monperdo pro nepagemo de kelkaj el niaj agentoj, kaj antaŭ kelkaj tagoj ŝtelistoj vizitis nian presejon kaj forŝtelis ledorimenojn, vestaĵojn, monon, poŝtmarkojn ktp. Se do vi nun ne ricevas respondon, bv. ne ĉagreniĝi pro tio. Ni respondos, kiam ni povos.

H. en B.-C. Por recenzi libron ni bezonas du ekzemplerojn: unu por nia administracio kaj aliajn por la recenzo.

O. en W. Senditaj 100 000 pmk. alvenis.

C. en P.-S. Senditaj 80 p. alvenis.

Gazetaro.

Shin-Aichi. Japana ĵurnalo en japana lingvo, Nagoya, enhavas ĉiusemajne Esp. fakon.

Panorama, Hago, 2. 8. (Ilustraĵo pri ekskurso de Nederl. Esperantistoj) kaj De Avondpost, Hago, 4. 8. (Ilustraĵo pri Esperantistoj en Hago).

L'Alliance Démocratique de l'Oise, Beauvais, 8 kaj 4. 8. (Art. de s-o L. Demarcy pri la cirkulero de ministro Bérard kaj Esp.)

L'X-Information, ĉm. organo de lernintoj de la Politeknika Lernejo (unu el la plej gravaj ŝtataj lernejoj), 28. 7. (Tri-paga art. pri Esp. de s-o Molesnet, ĉefiĝoj.)

Le Progrès Civique, 12. 8. (4-pag. art. pri Esp. de prof. Aulard.)

Pri la XIV-a skribis sekv. francaj gazetoj: Patrie, Petit Journal, La Presse, Peuple, L'Action Française en Paris; L'Indépendant en Perpignan; République Orléanaise en Orléans; Ouest en Angers; Journal du Havre en Le Havre; Mémorial de la Loire en St. Etienne; Télégramme en Toulouse; Télégramme du Nord en Lille; Echo de la Loire en Nantes; Populaire du Centre en Limoges; Lyon Républicain kaj Salut Public en Lyon. — L'Ére Nouvelle (17. 8.) kaj Le Petit Parisien, la plej disvastigita gazeto, publikigis artikolon de specialaj korespondantoj. Sud Est Républicain, Lyon, 7. 8. (Dukolona enketo por kaj kontraŭ Esp.)

Le Salut Public, Lyon, 8. 8. (Same)

Nouvelles de Lyon, 4. 8. (Presigis proteston de la E. G.)

Le Syndicat des P. T. T., organo de poŝtoficiatoj, 8. 8. (Pri Esp. inter ĵugosl. poŝtoficiatoj.)

L'Information, Paris, 10. 8. (Art. de s-o Archdeacon.)

L'Humanité, Paris, 12. 8. (Art. de Román Rolland pri Esp.)

Bourae Egyptienne, Kairo, 27. 7. (Malfavora art.)

Trgovinski Glasnik, ĵugosl. komerca gazeto, Beograd, 27. 7. (Art. de s-ano Klajić.)

Produktion und Wirtschaft, grava komerca ĵurnalo en Reichenberg, Ĉeĥ. — Speciala foirumaro. Enhavas artikolon de G. S. pri Esperanto, internationale Hilfssprache.

Morgenzeitung und Handelsblatt, Mähr.-Ostau, Ĉeĥ., 18. 7. (Art. de D-ro Auerlitz pri Esp.)

Hotel- und Gastgewerbezeitung, Reichenberg, 18. 8. (Art. de F. Kauffers pri la hotel- kaj gastindustrio kaj Esp.)

Volkzeitung, Bromberg, 11. 8. (Art. pri Internacia Urbo kaj pri Esp. Kongreso en Danzig.)

Nowy Dziennik, 12. 8. (Art. pri Esp. Kongreso Danzig.)

Diversaĵoj.

Iom pri senfadena telefono.

Per senfadena telefono la homa voĉo nun povas aŭdiĝi trans landon kaj maron po 186000 mejloj ĉiusekunde.

Nuntempe la efika distanca limo de tiu nova komunikigada metodo estas kelke da centoj da mejloj, sed tiuj limoj baldau pilgrandiĝos.

En Usono, Britlando kaj aliaj landoj, miloj da personoj interesiĝas pri la nova komunikilo; jam en Usono pli ol miliono da senfadenaj aparatoj nun funkcias en privataj domoj. Vekiga ĉi granda intereso pri senfadenaj aferoj, ke la fabrikiŝtoj de la necesaj aparatoj tute ne povas liveri novajn aparatojn sufiĉe rapide al mendantoj.

Kian signifon senfadenaj aferoj havas por Esperanto? Laŭ mia opinio nenio povas esti pli grava, ĉar nur lingvaj bariloj malhelpas la plenan internacian uzadon de senfadena telefono, kaj ĝi nur povas plene funkcii internacie per la helpo de Internacia lingvo.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri la estonta uzado de senfadena telefono, konstatoj la neceson de Internacia lingvo, kaj jam en diversaj teknikaj ĵurnaloj la temo estas diskutita. Legante tiujn ĵurnalojn, oni trovas, ke la inĝenieroj kaj specialistoj, kiuj traktis pri la lingvaj malfacilaĵoj, ne scias la faktojn pri jam vivanta lingvo Esperanto. Do, estas la devo de ĉiu Esperantisto propagandi Esperanton inter ĉiuj personoj en sia distrikto, kiuj interesiĝas pri senfadenaj telefonaĵoj.

J. Boyd-Andersen, Edinburgh.

Arpeĝoj.

1.

Tremantaj arpeĝoj mortante sonas. Nur etaj flugiletoj tuŝis la kordojn, tamen la dissonanta melodio miloble eĥas en mia animo.

Ĉi tiuj arpeĝoj similas al parolanta muteco, kiun aŭdas neniu krom revemulo... Ĉi tiuj arpeĝoj similas al vivanta senmoveco, kies tremadon sentas nur tiu, al kiu kaŭzas doloron — la silento.

Ho sonu, nur sonu tremantaj arpeĝoj, kiel funebraj muzikoj ĉe la enterigo de vivanta animo.

2.

En tombejo mi vagadis. Vokanta gesto de l' morto karenis mian frunton, sed homa malforteco katenis min al la vivo. Kontraŭvole mi ek-kriis: „Mi volas vivi!“ Mi bezonas la vivon!“

Responde al mia helpkrio sole la koloraj kapetoj de l' floroj ridetis al mi. Mi komprenis la mutan konsolon, kiu ŝvebis super la tomboj: — La morto naskas vivon! —

3.

Preferus mi paroli pri rideto via, kiu similas al sunradio de frua printempo, varme dorlotanta mian animon. Ĝi revivigas la koron je amo, ho, sed vi larmas!

UNIVERSALA LEGOLIBRO. Kompilis W. Fricke. Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda literaturo kaj originalaj Esperantaj. 176 pĝ., 12 1/2 x 18 1/2 cm. Berlin 1922. Esp. Verlag Ellersiek & Borel, G. m. b. H. Prezo: (en julio) 40 gmk., por mezvalutaj landoj 64 gmk., por altvalutaj landoj 80 gmk.

Laŭ amplekso kaj boneco ĉi tiu legolibro povas konkuri kun la plej ŝatataj el nia libraro; eble ĝi eĉ superas ilin. Tion priloĝu la legantoj kaj uzantoj. Fricke tre atente elektis kaj kolektis la materialon el la germana, ekstergermana kaj originala Esperanta literaturo. Ĉi tiu laŭnhave la naŭdek "erojn" la verkon konsistigantaj estas neble pro manko de loko. Suŝitas diri, ke oni trovas ĉion, kio meritas esti envicigata en vere modelan legolibron. Ĉi speciale taŭgas por esti uzata en pli-perfektigaj kursoj: kvazaŭ kreadomatio internacia ĝi servos tiujn, kiuj ne posedas la verkojn, el kiuj la kompilito ĉerpi. — La prezo estas malalta; parton de la honorario por sia laboro samideano Fricke donacis al la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko. Jen iminda faro! Sekvu lin aliaj verkistoj, por ke la Instituto posedu la necesajn rimedojn bezonatajn por atingi la oficialigon de Esperanto en Germanlando. — (G. Ajul.)

DU POEMOJ. Originale verkita en Esperanto de E. Miĥalski. Kun antaŭskizo de N. Krassowski. N-o 1. Eldonejo Esperantista „La Nova Epoko“, Moskvo, 1-a Tverskaja-Jamskaja, 56, kv. 5. 1922. 16 pĝ. 10 x 16 cm. Prezo: 0,100 Sm. E. L. A. rekomendis ĉi tiun libron du poemojn enhavantajn. Por elfunda kompreni ilin oni devas kompari la tute kun la nuntempa pentraarto. En ĝi koro kaj menso ne akordiĝas kaj inverse en la akraj ŝanĝoj de l' ritmo kuŝas la du perceptoj de pensanta kaj sentanta poeto. Laŭ la vario de l' vivo nuanca la poezia en kunsono kun la naturo-vivo. Multaj legantoj ŝatis impresojn el tio rezultantaj. — (G. Ajul.)

JARLIBRO 1922 de la Sennacia Asocio Tutmonda. 105 pĝ. 10 x 17 cm. Eldonis S. A. T., 23 rue Boyer, Paris XX. Prezo ne monriiĝa.

Tre praktike kaj tre zorgeme kompilita libro estas la unua jarlibro de la S. A. T. Ĝi ĉefe estas kompleta adresaro enhavanta pli ol 1000 adresojn ordigitajn laŭ landoj, urboj kaj sektoroj. Krome multaj ĉiuspecaj sciindaĵoj valorigas la libron, kiu estas bonega laborilo kaj helpilo por ĉiuj S. A. T.-anoj. — (G. Ajul.)

LUMO SUR LA VOJON KAJ KARMO. Verkita de Mabel Collins, tradukita de O. Collyn. 31 pĝ. 12 x 15 cm. Eldonis Teozofia Esperanta Ligo, Praha, Krakovská 17. 1922. Prezo: 5 kc.

La unua parto de l' libro preparolas tre detale ĉiujn regulojn por teozofianoj, verkita en Sanskrito jam antaŭ la naskiĝo de Kristo. Mallonga skizo pri Karmo, komprenebla nur al teozofianoj, montras misteran enprofundigon, senfinecon de l' estado kaj enkorpiĝon en la Spirito. — Speciala demando sin kaŝas en la elkernigo de la etiko. — (G. Ajul.)

Por Anglujo

Ni serĉas agentojn komercalajn ĉiujn ŝtatojn gasalajn karbidon murpapeojn katunajn fabrikelajn akcesoratojn; baldaŭ specimenojn kaj liverprezojn.

W. & R. Brierley Waterloo, Clitheroe Anglujo.

Vestu vin
bone kaj malmultekoste!

Mi liveras bonstatajn pantalojn ĉiuspecajn (konfektionaj kaj laŭ mezuro). Liveranto al multaj Esperantistoj. Postulu prezilatojn kaj specimenojn de

Joh. P. Schmidt, Zittau I. Sa. 85 (Germ.).

STRANGA HEREDAJO
Romano orig. verkita de H. A. Luyken.
320 paĝoj. Tre interesa.

Prezo (inkluzive sendkosto):
por
bonvalutuloj bind. 360.—, broŝ. 288.—
mezbonvalutuloj bind. 288.—, broŝ. 250.—
malbonvalutuloj bind. 180.—, broŝ. 144.—

★ ★

For la batallojn!
Lalastaj ekzempl. de la konata romano.
Prezo (inkluzive sendkosto):
por
bonvalutuloj 240.—
mezbonvalutuloj 190.—
malbonvalutuloj 120.—

La prezilo estas en germanaj markoj kaj ŝanĝebla laŭ la valuto.

Butin & Jung, Godesberg, Germ.
Poŝtĉeka konto Köln 92036.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptitaj por minimume du alnekvaj enprezoj) kosta po du enprezoj kaj po 30 vortoj (kon unu adreso) 0,20 dol., 0,50 fl., 1 nord. kr., 1 aŭst. kr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 3 lir., 7 fmk., 8 kc., 90 gmk., 100 hung. kr., 500 pmk., 2000 aŭstr. kr. Ĉiu povas pagi per laŭ la nomita valuto, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 elamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fr. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas aŭtentiĝi per 10 tagojn antaŭ publikigo.

LA SOLAJ ankoraŭ livereblaj numeroj de la malgrand-formata ET estas n-oj 1 (specimena), 5, 8, 9, 16, 23, 24, 25, 26, 27, 28, 29, 30, 31, 33, 34, 35, 36, 37, 38, 42, 47, 48, 49, 50, 52, 53, 54. Kiu deziras kompletigi sian kolekcion, mendu tuj! — Administracio de ET.

HIGIENAJN KAJ HIRURGIAJN KOMERCAJOJN el mola kaj malmola kaŭĉuko oni aĉetas ĉe Alfred Feller, Wien I, Sonnenfelsgasse 11, Aŭstrio. Korespondas angle, france, germane, itale kaj Esperante.

SKOLTOJ. — Skolta grupo „Iroquois“ deziras interrilati kun skoltoj ĉiulandaj. Skribu al Jiri Frankenberg, YMCA, Praha, Národní tr. 14, Ĉeĥoslovakio.

DU BONAĴN HELPMONO-ALBUMOJN, kiuj enhavas pli multe ol 500 pecojn da nefalditaj, bone konservitaj ekzempleroj, vendas por 80—40 dolaroj: Rud. Seller, Bremen, Germ., Schwachhauser Heersrl. 14.

AL MIAJ AMIKOJ! — Mi translugiĝis, kaj mia nova adreso estas: Anni Nora Pickert, Hohenebel, Neuaud 585, Bohemi.

Nederlanda Anonima Societo

Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels
(ĉefo: H.A. Schawächter)

63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Importo. Eksporto.

Pollanda Komerca Agentejo
Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri ::: la polaj komerclokoj. :::

Nur pograndaĵoj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

Eldonejo de Bibliografa Instituto, Leipzig, Germ.

La plej nova kartaro estas:

**MEYERS
KLEINER HANDATLAS**
(Malgranda Atlaso de Meyer)
Dua Eldono 1922

kun 48 ĉefaj kaj 35 aliaj kartoj kaj kun alfabeto nomregistro tole bindita.

Ĉiuj kartoj de tiu ĉi kartaro bezonega por domo kaj kontoro konformas al la hodiaŭa mondbildo, la nuna stato de l' esplorado kaj disvolvigo de l' trafiko.

Detalaj anoncoj kun prezilo senpage haveblaj. Liverado laŭdezire je monataj partopagoj de

F. Schönemann m. b. H., Leipzig, Täubchenweg 17

Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City

Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke ricevataj.

HUNGARA VINO

La Tokaj-Hegyalya-Provinca Vin-komerca A. S. Budapest

malmultekoste

eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj. (En lastaj monatoj oni sendis al Brazilio, Ĉilio, Nederlando, Germanio)

Botelvinoj. — Mondfamaj „Tokaj“-vinoj

Pogranda por seriozaj komercistoj! — Familioj povas mendi sendaĵojn malgrandajn en kastoj pakitajn!

Mendojn adresu al la delegito de UEA en Budapest: **Paŭlo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.**

SOCIALISTOJ! — Brita Ligo de Esperantistoj (Socialistoj) deziras ricevi reportojn pri Esperanta kaj laborista movadoj, vivkondiĉoj k. c. por presigi en Londona tagjurnalo laborista. — Cameron, 69 Schubert Road, Putney, London S. W. 15.

KIO DORMETAS EN VI? — Sendu al mi vian naskiĝadon, profesion, iom da skribaĵo de vi kaj unu vian franton aŭ egalvaloron, kaj mi diras al vi, kion vi povos atingi en via vivo. — Grafologo H. Chlubna, Wien V., Storkgasse 12.

18-JARA GERMANO deziras korespondi per il. pk. aŭ leteroj kun junaj gesamideanoj el New York, kiuj helpus al li perfektigi en la angla lingvo. Rekomence li helpus al progresintoj finstudaj la germanan aŭ farus lan alian komplezon. — Philipp Hahn bei Frau Höller, Götzenkirchen-Horrem bel Köln am Rhein.

OKUPO DEZIRATA. — Bonvola junulo, 18-jara, serĉas eksterlande oficon aŭ okupon kiel kalkulisto aŭ korespondisto. Kono de itala, franca, angla, hispana, Esperanta, germana lingvoj. — Skribu al Giolla Giuseppe, Via Ponte Seveso 50, Milano 31, Italujo.

Korespondo kaj Interŝango.

Mi ŝanĝas poŝtmarkojn, speciale kun Litovio, Ruslando kaj la hindaj landoj, ankaŭ fotografiajn. — J. B. E. de Koster, Amsterdam, M. H. Trompsstraat 23, I., Nederlando.

S-oj Georg Pfannenschmidt, Hermannstr. 11, Richard Lucie, Fruchtsir. 10 kaj Julius Wockenfuß, Töpferstr. 4, en Forst (Laußitz), Germ., deziras korespondi.

Ruslanda Esperanta Komerco-Oficejo
„Espero en Moskvo“

Miasnitckaja, 14.
Poŝtkesto n-o 680.

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj ktp. :: Prokuras komercajn adresojn. :: Eldonante informacian adresaron komercan, ĝi petas sendi al ĝi katalogojn ktp. :: :: ::

Fondinto **ALEKS. PRAGER**, Prezidanto de Komerca kaj Industria Komitato de Centra Regiono en Moskvo.

Tri Esp.-Tagoj en Zittau.

La laborema Esperanto-grupo de la fame konata orientaksa urbo Zittau okazigos sian ĉi-tujaran 11-an fondifeston kiel tri propagandtagoj.

La festo, kiu okazos de la 6-a ĝis la 8-a de Oktobro sub la nomo „Tri Tagoj en Esperantujo“

havos la jenan programon:

6. okt.: Malfermo de la tritaga ekspozicio. — Varbparolado.

7. okt.: Akcepto de la eksteraj kaj eksterlandaj partoprenantoj en la stacidomo kaj en la grupejo, Bahnhofstr. (stacidomstr.) — Renkonto en hotelo „Goldene Weintraube“ (ora vinberaro) kaj poste gvidado tra la urbo kun montrado de ĝiaj vidindaĵoj. — Festvespero.

8. okt.: Liberelegia Esperanto-diservo. — Ekzamenoj. Koncerto de la urboroketoj antaŭ la ekspozicio. — Komuna, nedeviga tagmanĝo. — Kunsido kaj amika kunveno. — Adiaŭa festvespero.

Se la registaro konsentos, en la stratoj servados dum la festo Esperantistoj de la ŝtata polico. — Bonaj artistoj promesis sian subtenon por la festo. — Post la komenco de la dancado dum la festvespero ni arangos Esperanto-kabaredon por la nedanculoj. — Kompletan festordon ni ankoraŭ komunikos.

Partoprenantoj bonvolu baldaŭ — plejeble tuj — aliĝi kaj informi nin pri la deziroj rilate al loĝejo (ĉu unuaklasa aŭ mezklasa hotelo aŭ privataloĝejo). Ankaŭ por la tagmanĝo ni petas aliĝojn. Samtempe scigu nin pri eventuala partopreno je la ekzameno.

Festpartoprenkartoj estas riceveblaj post alsendo de germ. mk. 50.— aŭ ĉsl. kr. 6.— al nia komitatano Karl Knoll, Zittau, Theodor-Körner-Allee 11, aŭ al lia bankkonto ĉe la „Stadtgroßkassē Zittau Nr. 4037 (Esperanto)“. Donacoj estas danke akceptataj.

Samideanoj! Subtenu nian diligentan kolegaron, aliĝu tuj je nia kongreseto, kiu kvazaŭ plenigu la senkongresan jarduonon. Venu grandare, venu amase, por ke la movado en nia urbo kresku kaj prosperu! Ni kore invitas vin!

Zittau, la 28. Julio 1922.

LA FESTKOMITATO de la loka Esp. Grupo.

Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13

Telefono: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.
Procentado de kontantaj deponoj.
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.
Perado de ĉiuspecaj negocoj.

Anoncoficejo kaj Gazetoficejo
„Promien“- (Radio)

Warszawa, str. Widok 19

akceptas anoncojn por ĉiuj jurnaloj de la mondo, peras abonon de ĉiuj gazetoj.
Oni korespondas Esperante.

Kopilibrojo de Günter

por skribado kun ahato aŭ kradono por ĉiuj celoj.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Emil Günter, Freiburg i. Br. (Germ.), Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilibroj.

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeiffer), Wien II/1, Postamt 54.

Belgio: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtkesto n-o 28420.

Brazilo: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.

Bulgara: Georgi H. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.

Ĉeĥoslovaka: Otio Sklenčka, Hradec Králové. Otio Lumpe, Trautenau, Batona: Est. Esp. Unuĝo, poŝtkast 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Franca: Esp. Centre Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aolama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Latvia: Talvaldo Indra, Riga, Pasa kaste 47b.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltla g-ve 12, Kaunas (Kovno).

Nederlanda: J. Ravestein Jr. v. Aarssenstraat 200, s-Gravenhage. (Poŝtkesto konto Haag n-o 2878).

Pola: Adolfo Oberrotman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3128). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordecklego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.

Rusa: Mikaelo Valentinov, Ĉudovsko.—per. 6, Komitato de Esperantistoj SVJAZI.

Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 800 Fifth Avenue, New York City.

LA PLEJ LASTA ELTROVAJO!!!

LA FORNO „MOUSSON“

superas ĉiujn ĝisnunaĵojn! Por domoj, ĉambroj, oficejoj, fabrikoj ktp. La varmeco iras al mal-supre. Ĉio forbrulas. Ne restas videbla fumo. Plej granda eluzo de ĉiuj brulatoj. Uzebla por ĉiuj hejtmaterialoj. — Patentoj anonciataj en ĉiuj landoj!

Licencioj doneblaj al multaj landoj por fabrikado!

Informojn peras la del. de UEA por Budapest: **Paŭlo Balkányi, Budapest VI, Hajos u. 15.**

Lustroj el Kristal-vitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj, elektra aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettich Nachf. Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60.
Eksporto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

S-o Anders Müller, Degersberg, Junsele, Svedujo, deziras korespondadon kun ĉiulandaj Esperantistoj.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kartojn kaj fotografiajn kun ĉiulandaj Esperantistoj. — J. B. E. de Koster, Amsterdam, Holland, M. H. Trompsstraat 23, 1-a etg.

Tiberio Hajdu, ev. fara., Banaka-Bystrica, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi por ilustr. poŝtkartoj.

S-o Boris Vladimirov sciigas al siaj iamaj korespondantoj, ke li vivas kaj loĝas en Moskvo, Ruslando, Strastnoj boulevard, d. 8, kv. 5.

Frans Wuyts, Touwstraat, 55, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Felix Roosbroeckx, organisto-pianisto, Kersbeekstraat 11, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi kun eksterlandanoj, prefere muzikistoj, se ne kun geartistoj. Poŝtmarkojn interŝanĝas kun la tuta mondo per samnombraj germanaj poŝtmarkoj (sendu minimume 50) Oskar Köhler, Oelsnitz i. Vogtl., Bergstr. 5, Germanio.

S-o E. Lauwers, Lovellingstraat 7, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi per leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Aleksy Weissbrodt, Nowe, ul. Zielona 6, Polio, deziras korespondi per ilustr., ankaŭ artistaj poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

S-o Anatolio Volohev, Kambarovskaja 48, Pambov, Rusujo, deziras korespondi.

S-o G. Benson, Lockleys, Sud-Aŭstralio, Pierson Street, deziras korespondi kun gesamideanoj per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.